## *NAŬTAGA PREĜO AL SANKTA PIO LA 10-a*
## *por akiri gracojn*

Sankta Pio la 10-a, kiu venis al la vivo en humila domo de eĉ pli humila vilaĝo, kaj en la sama malriĉeco de la naskiĝo, kvankam altigita Papo de la mondo, volis vivi kaj morti sur la spuroj de Jesuo humila kaj malriĉa, estingu en ni tiun senmoderan deziron je tero kaj je grandeco, kaj havigu al ni trovi en la malriĉeco kaj en la simpleco tiun feliĉon de la spirite malriĉaj, kiuj nur sopiras al la regno de la ĉieloj.

*Gloro al la Patro...*

Sankta Pio la 10-a, kiu, proklamita Paŝtisto de la katolikaro, defendis kun dolĉa firmeco la rajtojn de la Eklezio kaj la ortodoksecon de la doktrino, kaj intencis realigi en la mondo iun universalan restarigon en Kristo, subtenu en ni, insiditaj de la eraro, tiun kuraĝon en la konfeso de la kredo kaj en la aliĝo al la Eklezio, kiu certigu nian sanktiĝon kaj restarigu sur la tuta homaro la regnon de Dio.

*Gloro al la Patro...*

Sankta Pio la 10-a, tute amo kaj dolĉeco al la homoj, por kies savo vi donacis vian multforman servadon kaj por kies paco oferis la vivon, faru ke la homa familio vivu kaj prosperu en la unueco preĝpetita de Kristo, kaj ekbrilu sur la mondo tiu vera paco, kiu estas frukto de frateco kaj de justeco, kaj kiu estas feliĉiga preludo al la ĉielo.
Kaj al ni, kiuj petegas vian protekton, donacu la gracojn, kiujn ni atendas: asistu nin dumvive, helpu nin ĉe la morto, kaj faru, ke ni partoprenu kun vi la vidon de Dio dum jarcentoj da jarcentoj. Amen.

*Gloro al la Patro…*

*Tradukis: Antonio De Salvo Foto kaj aranĝo: Marija Belošević (2017)*




# SANKTA PIO LA 10-a, papo
# PATRONO DE IKUE

## PREĜO AL SANKTA PIO LA 10-a

*en la jarcenta datreveno de lia morto*
*la 20-an de aŭgusto 1914-2014*

Paŝtisto universala
en tempoj malfacilaj por la Eklezio kaj por la mondo
vi volis, kun humila rezoluteco,
"renovigi ĉion en Kristo".
Helpu nin revigligi nian fidon en Jesuo Kristo:
Li estu la firma roko de ĉiu familio,
la intima amikeco de ĉiu junulo,
la forto serena de la pliaĝo,
la koro akceptema de ĉiu paroko.

En via vivo vi amis intense Dion
kaj vi strebis por konigi Lin.
Helpu nin diri al la mondo la belan sciigon
de la senfina mizerikordo de la Patro,
plifortigu la misiistan elanon de ĉiu komunumo,
prilumu tiujn kiuj engaĝiĝas en la transdono de la kredo,
igu nin ĝojaj atestantoj pri la Resurektinto.

Kiel bona paŝtisto vi gvidis la Eklezion
al la viva fonto de Eŭkaristio;
malfermante ĝian aliron al la infanoj,
vi igis ĝin la pano kiu subtenas la iradon
en ĉiu sezono de la vivo.
Helpu nin igi ĝin la viva centro de nia ekzisto
kaj de ĉiu kristana komunumo,
fonto je kiu ĉerpi la dolĉan forton de karitato.

Dum vi finis vian surteran vivon
ekbrulis en la mondo granda milito
kaj via koro ĝemadis je la penso de tiom granda sufero.
Alvoku por ni ĉiuj la donacon de la paco,
de la frateco kaj de la solidareco.
Vigulino Maria, kiun ĉe la sanktejo de Cendròle
ekde infanaĝo vi lernis preĝi kun fido,
propetu kun vi por la Eklezio
kaj por tiuj kiuj estas en la provo.
Amen.

## PREĜO AL SANKTA PIO LA DEKA

***por akiri gracojn***

1 - Sankta Pio la 10-a, vi kiu scipovis vivi kutime je la ĉeesto de Dio, helpu nin orienti al la Sinjoro nian tutan vivon: la laboron kaj la studon, la familiajn kaj sociajn rilatojn, la amuziĝon kaj la suferon, la vivon kaj la morton.

*Gloro al la Patro...*
*Sankta Pio la 10-a, preĝu por ni.*

2 - Sankta Pio la 10-a, vi kiu estis saĝa kaj konkreta reformisto, kapabla ankaŭ je novigaj kaj profetecaj gestoj, de la ĉielo daŭrigu hodiaŭ la mision, kiu konfidis al vi la Sinjoro.
Propetu por la Eklezio, por ke ĝi povu superi la danĝerojn kiuj minacas ĝin, kaj plenumi sian mision en la mondo. Havigu al ĝi persiston en la fideleco, en la kuraĝo kaj en la sankteco.

*Gloro al la Patro...*
*Sankta Pio la 10-a, preĝu por ni.*

3 - Sankta Pio la 10-a, vi kiu estis ĉiam atenta pri la spiritaj kaj materiaj necesoj de la personoj, kiujn vi alpaŝis en via paŝtista servado, al vi ni adresas ankaŭ nin kun konfido.
Via koro de "bona Patro" komprenas tion, kion ni volas diri. Havigu al ni de la Sinjoro la gracojn, kiuj estas konformaj al Lia volo kaj por nia vera bono. Aparte ni petas de vi la gracon…

*Gloro al la Patro...*
*Sankta Pio la 10-a, preĝu por ni.*